



No. 26.

# LITERATURO

## ENHAVO

*El la Redaktejo —*  
*Rakonto de Maljuna Klubano*  
*— Resignacio — Maljuna*  
*Frenezulino—Mortintaj Folioj*  
*— Pratempa — Elektitaj*  
*Libroj*

BERTHOLD SCHMIDT  
— COUNSELOR-AT-LAW  
12 EAST 41st STREET  
NEW YORK CITY

Aprilo—Junio, 1925



INTERNACIA

BRITA ESPERANTISTA ASOCIO,  
17, HART STREET, LONDON W.C.1



ZAMENHOFA

# “LITERATURO”

**Kvaronjara Gazeto Esperanta**

Adreso de la redakcio kaj administracio:

**B.E.A., 17, Hart Street, London, W.C. 1,  
Anglujo.**

---

**ABONO.**—Afrankite: por unu jaro, 2s., aŭ 2½ svisaj frankoj: unu numero 6p., aŭ 3 respondkuponoj.

**REKLAMOJ KAJ ANONCOJ.**—Por prezoj skribu al la administracio.

**REDAKCIO.**—Manuskriptojn, k.t.p., oni bonvole sendu al la Redakcio. Tradukantoj antaŭ ol sendi siajn verkojn bonvole ĉiam certigu, se necese, ĉu la aŭtoro aŭ la eldonintoj permesas represigon. La redakcio rezervas al si la rajton korekti erarojn de gramatiko, stilo, k.t.p.

Oni bonvole skribu sur nur unu flanko de la papero.

La Redakcio ne garantias resendon de manuskriptoj, krom laŭ speciala peto.

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukantoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k.t.p., en ĉi tiu gazeto.

---

**BRITA ESPERANTISTA ASOCIO**  
**17, Hart Street, London, W.C. 1, Anglujo**

---

*Antaŭa Hon. Prezidanto:* D-RO L. L. ZAMENHOF

*Hon. Prezidanto:* J. M. WARDEN

*Hon. Kasisto:*

C. A. FAIRMAN

*Hon. Sekretario:*

CHARLES H. EDMONDS

*Sekretario:* MONTAGU C. BUTLER

*Administranto:* HARRY A. EPTON

---

La Asocio konsistas el Membroj (10s. jare), Fratuloj (21s. jare), Asociitoj (minimumo 2s. 6p. jare) kaj Filiaj Grupoj.

---

**LA ASOCIO ELDONAS:—**

*British Esperantist*—monate: angle kaj Esperante: sendata al Membroj kaj Fratuloj: ne aparte abonebla.

*Literaturo*—trimonata literatura gazeto en Esperanto: pri abonoj vidu supre: sendata senpage al Membroj kaj Fratuloj.

*International Language*—Monate: precipe angle: celas pri-studi la problemon pri internacia lingvo kaj rekomendas la akcepton de Esperanto kiel solvon, ankaŭ enhavas instruajn artikolojn pri Esperanto kaj aldonon por komencantoj, *La Juna Lernanto*: abono, afrankite por unu jaro, 2s. 6p.; unu numero 2½p. afrankite.

# LITERATURO

TRIMONATA GAZETO ESPERANTA

*Hon. Redaktoro*—F. RICKETT SHELTON.

---

Vol. 4

Aprilo—Junio, 1925

No. 2 (26)

---

## EL LA REDAKTEJO

Perdo, gajno, devo ; ĝojo, ĉagreno, laboro,—ĉi tiuj faras por la pli multo el ni la erojn de niaj tagoj kaj jaroj. Do, en la arto, ĉu literature, pentre, muzike, oni esprimas la vivon prezentante al la neartisto konceptojn, kiuj naskos ideojn de unu aŭ pli el tiuj vivaj elementoj. Do, plue, elektante por ĉi tiu gazeto tion, kio eble esprimos la vivon, ni elektas agrablajn kaj malagrablajn, por ke ni movu la spiriton en simpation.

Ĉar la esenca potenco de la artisto kuŝas en lia vidpovo ; li vidas pli fore, pli klare, pli vere ol ni, kiuj ne estas artistoj de lia alta grado. Kion li vidas, li skribas, aŭ pentras, aŭ sonigas, kaj ni ricevas laŭ niaj kapabloj. Estas tial devo, ke ni etendu, kaj fortigu niajn kapablojn per konstanta studo de la bildoj proponitaj al ni de la artistoj, de la vivo mem. El tio kreskas la kunsento, la toleremo, kiuj distingas la grandanimajn homojn, kiujn ni ĝojas renkonti, de kiuj ni lernas la lecionojn kiuj helpas nin en la nefacila pasado tra niaj jaroj ; kiuj faras nin humilaj, kontentaj, kviete laboremaj. Nia Esperanto jam havas multon da boneco, kaj beleco ; al ties pli-grandigo kaj pliperfektigo devus esti ĉiam nia celo.

Necesas ĉial, ke ni fortikigu la manojn de tiuj el ni, kiuj povas produkti artajn verkojn. Tion ni povas fari perfektigante nian scipovon de la lingvo mem, por ke ni kapablu kompreni la valoron de ĉiu bonverko publikigita, kaj vice rekomendi tiajn al la komencantoj. Precipe, estas bone studi originalajn verkojn, ĉar en tia, la menso de la aŭtoro agas libere ; li povas elekti la taŭgan vorton ; li povas, li ja devas esprimi sin mem, kaj, laŭ lia ennaskita, originala artismo, liaj vortoj enhavas la plej grandan kaj larĝan signifon, kaj plej facile kaj certe atingos la homan koron.

montris al li grandan respekton. Tio ja estas la moro de la mondo. Mia fianĉino nuligis nian fianĉecon, transigis sian manon kaj ŝajne ankaŭ sian koron al la nova Krezo, kaj post konvena intertempo edziniĝis kun li. Sed tio ne estis la plej maldolĉa ingredienco en mia pokalo. Por pravigi sian agon, ŝi kaŝe diskonigis la famon, ke la bankroto de nia firmo estis trompa bankroto, kaj ke mia patro, timante la sekvojn de krimaj spekulacioj, sin mem mortigis. Ne sufiĉis, ke mi perdis mian havon kaj mian feliĉon, pereu ankaŭ mia honoro, por ke la mondo ne skuu la kapon pri ŝi!

“Eble vi ne miros, sciigante, ke mia amo transiris en furiozan malamon. Ho! kiel mi malamegis tiun virinon! Ankaŭ mi tiam kredis, ke “nenio en la mondo iam povus ŝanĝi mian sintenon kontraŭ ŝi.” Unu tagon, kiam ŝajne mi tuŝis ĝuste la fundon de mia mizero, mi ricevis tre surprizan leteron de longe forgesita onklo en Aŭstralio. Tiu onklo, sola frato de mia patro, estis ĉiam por mi enigmo. Aludo pri li ĉiam tre ĉagrenis la patron; lia nomo do preskaŭ neniam menciigis en la hejmo. La letero, kiu montris, ke mia onklo plene scias kaj komprenas mian mizeron, esprimis la plej aman kunsenton kaj simpation. Per ĝi li sciigis min, ke li estas fraŭla posedanto de vasta bieno kaj de aliaj komercaj entreprenoj. Tre kore li petis min ekvojaĝi al Aŭstralio, kaj tie, ĉe li, rekomenci mian vivon. Tuj mi ordigis miajn aferojn, kaj survojiĝis.

“Ĉio feliĉe iradis, ĝis la ŝipego levis la ankron en la haveno de la insulo Cejlono, la lasta haltejo. Apenaŭ ni estis sur la alta maro, mi eltrovis, ke Hilda, mia iama fianĉino, kaj ŝia edzo estas sur la sama ŝipo kun princa sekvantaro. Ili vojaĝis ĉirkaŭ la mondon, kaj jam pasigis kelke da semajnoj en Hindujo kaj Cejlono. Kia ĉagreno! La bela, juna edzino de fabele riĉa anglo tuj monopoligis la atenton de la tuta unuaklasa pasaĝeraro, kaj alprenis la estrecon super la plej ekskluziva societo. Gesinjoroj Barnett tre rimarkeble ignoris min, tiamaniere, ke post nemultaj tagoj eĉ la kunvojaĝantoj, kiuj antaŭe estis por mi tre afablaj, nun turnis al mi la dorson. Mi sentis min malice izolita kaj ĝismorte malfeliĉa. Ho,

kiel mi sentis la pikon, kaj kiel maldolĉe—pli maldolĉe, ol antaŭe—mi malamegis tiun virinon, kaj abomenis ŝian edzon !

“Unu tagon, kiam ni alproksimiĝis al la insulo Kokos (aŭ Keeling), leviĝis unu el tiuj teruraj uraganoj, kiuj subite furiozas en tiu regiono. La direktilo de nia ŝipo rompiĝis, kaj ni ĵetiĝadis en tiu danĝera kaj tiam ankoraŭ ne sufiĉe konata maro. En la mezo de nigra nokto, kies terurecon mi neniam forgesos, ni albatiĝis al koralrifo, kiu fendis grandan, subakvan truon al la ŝipo. La plej fantaziaj priskriboj pri ŝipopereoj, kiujn mi iam legis, restas malproksime de la freneziga realeco de tiu katastrofo. La ŝipego rapide malleviĝis, kaj la plej granda konsterno regis. Savoboatoj estis senutilaj. Antaŭ ol mi sciis, kiel tio okazis, mi trovis min en la akvo, alkroĉiĝante al naĝanta ferdekseĝo.

“La maro estis kvazaŭ freneziĝinta infero. La vento surdige muĝis. Montosimilaj ondoj ĵetadis, supren kaj malsupren, naĝantajn homojn, boatojn kaj rompaĵojn, kiel korkojn. Kun tondra bruoj ili batiĝis kontraŭ rokojn kaj rifojn, fariĝante jen bolantaj, ŝaŭmantaj, siblegantaj kaldronegoj, jen englutemaj akvoturnejoj. De tempo al tempo lumigis la scenon ekbriloj de fulmo, sekvataj de tondroj, tiel orelfendaj, ke oni povus pensi, ke la tuta ĉielo frakasiĝas. Subite, ĉe brila fulmolumo, mi vidis dekon da homoj, viroj kaj virinoj, forte baraktantaj en la akvo, por savi sin per jam plena boato. En tiu kriza momento bele montriĝis la interna kavalireco de la viroj antaŭ virinoj, kun escepto de unu viro, mia malamiko, Barnett, kiu duonfreneze penis engrimpi en la boaton, forŝovante du virinojn. Unu el la virinoj estis Hilda, lia propra edzino! Tiu malnoblega ago tiel indignigis du boatistojn, ke ili repuŝis lin en la akvon per siaj remiloj. Kun malhoma, ŝiranta dolorkrio, kiu ankoraŭ sonas en miaj oreloj, la multmilionulo malaperis en la ondoj.

“Mi ne scias, kiel longe daŭris tiu terureco. Kiam mi rekonsciiĝis, mi kuŝis sur sabla bordo de malgranda insulo—sola! La suno staris alte sur la ĉielo. La uragano jam elfurioziĝis, kaj, krom muzika plaŭdado de la ondoj, kaj okaza krio de marbirdo, dolĉa silento regis.

La naturo denove alprenis serenan, senkulpan aspekton. Pasis kelke da momentoj, ĝis mi komprenis, en kia situacio mi troviĝas. Mi memoras, ke la unua konscia sento, kiun mi havis, estis sento de malsato kaj soifo. Poste, kiam mi vidis en kelka malproksimeco sur la bordo aron da rompaĵoj de la ŝipo, la plena seriozeco de mia stato subite ekstaris antaŭ miaj okuloj.

“Nia ŝipo devojiĝis orienten, kaj mi nun min trovis, kredeble, ie inter la insuloj Kokos kaj Christmas (Kristnasko) en regiono tre malofte vizitata de ŝipoj pro la multenombreco de danĝeraj rifoĵoj. Multaj jaroj povus pasi, ĝis alia ŝipo trairos tiun maron. Efektive kvar jaroj forpasis. Feliĉe la unua esploro de la insulo montris al mi, ke mi ne bezonas timi morton de malsato aŭ soifo. La insulo posedis centon da kokospalmoj, krom bananujoj, panarboj (lat. *artocarpus*), manĝeblaj radikoj kaj aliaj utilaj kreskaĵoj. Golfeto svarmis per fiŝoj kaj moluskoj. La tuta bestaro konsistis el kelke da testudoj, ratoj kaj vespertoj. En la mezo de la palmaro mi trovis lageton kaj ritme plaŭdantan rivereton kun pura, dolĉa akvo, klara kiel kristalo. La klimato de la insulo estis tre agrabla kaj saniga.

“Tiel bonvola providenco ŝajne estis antaŭzorginta, kaj preparinta por mi malgrandan paradizon. Sed, kvankam la trovita abundo da necesaĵoj forigis ĉiun timon rilate al nutraĵoj, mi malbenis mian sorton, kaj maldolĉe demandadis min, kial *mi*, sola, estas savita; mi, malfeliĉulo, por kiu la ekzisto mem ne estis dezirataĵo.

“La sekvantan tagon mi faris pluan gravan eltrovon: Mia tre longforma insulo estis efektive du insuloj, etendiĝantaj en preskaŭ rekta linio. Ili estis apartigitaj de tre mallonga kaj mallarĝa markolo. En la vespero de tiu tago mi sidis sur altaĵeto apud tiu markoleto, en malgaja enpenseco, rigardante la subirantan sunon. Subite mi vidis sur la najbara insulo la figuron de virino! Mi eksaltis de ĝoja surprizo; sed tuj poste konsterno ekkaptis min: La virino estis Sinjorino Barnett, Hilda, mia iama fianĉino! Ankaŭ ŝi montris signojn de granda konfuzo. Torento da nepriskribeblaj sentoj trafluis mian koron,

kiuj en la daŭro de kelke da minutoj preskaŭ forprenis al mi la povon pensi. La plimulto el la tumultaj sentoj estis malprecizaj ; nur unu, subkuŝanta ĉiujn aliajn, estis klara, superrega : senmorta malamo. Kun rigida, nemalkomprenebla mieno mi turnis al ŝi la dorson, kaj rapide foriris. Tuj kiam mi estis for de ŝia vido, mi levis en ribela spirito la pugnojn al la ĉielo, kaj voĉe ĵuris, ke, kio ajn okazos, mi havos nenian interrilaton kun ŝi. De tiu momento komenciĝis teruraj animkonfliktoj, kiuj turmentis min en la tuta daŭro de la kvar jaroj. Ĉiam venkis aŭ la malamo, aŭ la fatala ĵuro, kiun mi eldiris.

“ La horo jam estas malfrua, kaj la memoro pri tiuj travivaĵoj tre doloriga ; tial permesu al mi rapidi super ĉi tiu parto de mia rakonto.

“ Mi ne vidis la virinon en la daŭro de tri tagoj, sekve mi supozis, ke ŝi estas, tiel same, kiel mi, la sola okupanto de sia insulo. Ĉiutage, dum kelka tempo, mi trovis sur la marborda sablejo diversaspecajn lignaĵojn, partojn de la rompiĝinta ŝipego ; sed ankaŭ alnaĝintajn kadavrojn—entute ses. Unu el tiuj lastaj estis la kadavro de mia malamiko, Barnett ! Pie mi enterigis ĉiujn, malpeziginte ilin je ĉio, kiu povos al mi utili. Unu tagon, timante, ke Sinjorino Barnett povus sin trudi al mi, mi starigis kontraŭ la alia insulo blankiĝintan tabulon, sur kiu mi skribis per lignokarbo grandlitere la vortojn :—*Aliro Malpermesata ! !* Post kvin aŭ ses monatoj aperis sur la alia flanko de la markoleto simila tabulo kun la vorto : *Kompatu !*

“ Mi ne kompatis, sed ankoraŭ plie hardis al mi la koron kontraŭ ŝi. De tiu tempo mi evitis la parton de mia insulo, apudan al la markolo. Mi ne volis vidi, multe malpli aŭdi pluajn alvokojn. Efektive mi nur tre malofte ekvidis ŝin.

“ Tiel pasis jaroj. Mi diligente laboris kiel Robinson Crusoe, kaj iafoje prosperis al mi forgesi, en la daŭro de tutaj tagoj, la virinon sur la alia insulo. De tempo al tempo mi sentis min eĉ sufiĉe kontenta, penante kredigi al mi, ke la ekstera mondo enhavas por mi nur tre malmultajn allogaĵojn. Tamen, tre ofte la sento de

soleco estis terura, kaj la sopiro al homa kunuleco estis preskaŭ superrega. Malgraŭ tio mi senŝanceliĝe ignoris la penojn, kiujn ŝi faris, por moligi mian obstinan malamon. Miaj solaj kunuloj estis aro da malsovaĝigitaj ratoj kaj du papagoj. Dume mi observis diligente la horizonton.

“Fine, unu belan frumatenton, starante apud la ekstremajo de mia insulo, plej malproksima de la alia, mi ekvidis velŝipon, sufiĉe proksime de mi. Imagu, se vi povas, mian ĝojon! Mi sukcesis altiri al mi la atenton de la ŝipanaro. Ili surakvigis boaton, kaj mi estis savata. Sed kune kun la ĝojo venis interna, korŝira konflikto: Ĉu mi parolu pri la virino sur la najbara insulo? Ĉio bona, restinta en mi instigis min konfesi al la ŝipestro la ekziston de la kompatinda virino; kaj interna voĉo demandis, ĉu malkompato en tiu momento ne transirus ĉiujn limojn de homa malamo. Ankorau hodiaŭ mi ne povas kompreni, kia malbona spirito min regis. Mi povas nur tre malklare revoki al mi en la memoron duonfrenezan penon ne pensi pri ŝi. Kio tiam okazis en mia spirito, mi nun ne scias, sed ŝi restis postlasita. Ho! mia amiko, kion mi suferegis pro tiu malnobla, kruelega ago! Se iam koro estis persekutata de memriproĉoj, tiu koro estis la mia. La sekvanta tago estis dimanĉo. La kapitano, skoto, gvidis Diservon sur la ferdeko, kaj mi ĉeestis la solenon. En la daŭro de tiuj kvar jaroj la penso pri Dio preskaŭ ne venis al mi en la kapon, Malamo kaj Dio ja ne povas loĝi en unu sama koro. La temo de la simpla prediketo estis la pardonema amo de Dio. Prezentu al vi do mian koron disŝiritan de pentoj! Kia malvirtulo mi estis en miaj propraj okuloj!

“Mi atingis en tiu mensostato la bienon de mia onklo. Ho ve! la bonulo intertempe mortis, postlasinte en testamento instrukciojn, ke preskaŭ lia tuta havo estu administrata, pro mi, de lia notario, Sinjoro Bond, en la daŭro de kvin jaroj. En la okazo, se, post paso de tiu tempo, nenia vivosigno venos de mi, la heredaĵo likvidiĝu kaj disdoniĝu al kelkaj bonfaraj institucioj. La novaĵo pri la morto de mia onklo plenigis mian koron per granda malĝojo. Kiel eble plej frue mi vizitis la notarion, kiu



estis ne nur notario, sed ankaŭ intima amiko de mia mortinta onklo. Sinjoro Bond akceptis min kun montrado de sincera ĝojo kaj rakontis al mi, responde al mia insista peto, la historion de mia parenco. Tiu historio kortuŝis min plej profunde, kaj montris al mi la malbonecon de mia konduto kontraŭ Sinjorino Barnett en ankoraŭ pli malbela lumo.

“Mia onklo kaj mia patrino iam estis gefianĉoj. Mia patrino estis tiam tre juna, sensperta knabino, kiu ne sufiĉe konis sian propran koron. Kiam mia patro, kiu estis studinta altfinancan sciencon en Paris kaj Berlin, revenis, ekstarigis inter li kaj la fianĉino de lia frato nevenkebla amo. Ekkomprenante tion, mia onklo retirigis kun rompita koro, kaj elmigris al Aŭstralio. Grandanime kaj senbrue li rezignis la amatinon; sed li neniam ĉesis ŝin ami. Ne nur tion, sed li envolvis min, ŝian solan infanon, en tiu senmorta amo. Kompletigu al vi la bildon.

“Mi konfesis al Sinjoro Bond mian malbelan sekreton, kaj sciigis al li jam faritan decidon, tuj peni reiri al la insulo, por liberigi la kompatindan, postlasitan virinon. Kun la helpo de mia nova amiko mi tuj ekipis ŝipon, kaj ni forvojaĝis. Kia vojaĝo! Neniam ŝipo ŝajne tiel malrapidaĉis. Mia pentado jam delonge forbruligis la obstinan malamon; kaj renaskigis en mia koro la malnova amo. Mia animo konsumigis de sopiro kaj timo: Ĉu ŝi ankoraŭ vivas? Ĉu ŝi nun forpuŝos min, kiel mi forpuŝis ŝin antaŭe? Fine, post paso de kvar longaj semajnoj, ni trafis la insulojn.

“Jen ŝi staris levante la manojn al la ĉielo el dankeco pro la savo. Ni havis kun ni la edzinon de la ŝipestro, patrineca virino, en okazo de bezono; kaj verdire Sinjorino Barnett bezonis la ĉeston de virino, ĉar la stato de ŝia tualetado estis tia, ke ŝi ne povus dece sin vidigi al viraj okuloj. Ni renkontigis duope. Ŝi aspektis pala kaj malfortika, sed ŝia vizaĝo estis la vizaĝo de sanktulino kaj estis ankoraŭ pli bela, ol iam antaŭe. Mi ne povus priskribi la luman ĝojon kaj la profundan amon, kiuj radiis el ŝiaj mildaj okuloj. La memoro pri tiu momento estas konservata kiel la plej kara trezoro en la sanktejo

de mia koro. Malmultaj klarigoj estis bezonataj. Ni konfesis unu al la alia nian kulpon kaj solene renovigis nian fianĉecon. Poste mi sciigis iom post iom, kiel terure ŝi suferadis; kiele ŝi sopiradis sin ĵeti genue antaŭ mi, por elpetegi mian pardonon kaj mian amon.

“Kiam, dume, do mi estis karesinta mian malnoblan malamon kontraŭ ŝi sub la regado de mia malpia ĵuro, ŝia animo puriĝis en la fandoforno de aflikto kaj pento. Pli nobla animo, ol mia. Tuj post nia alveno en Aŭstralio ni geedziĝis. Dek jaroj da superega feliĉo estis al ni donitaj . . . .”

En tiu momento envenis en la ĉambron sinjoro, ekkriante:

“Ĉu vi scias, Sinjoro Elmore, ke noktomezo jam longe pasis? Kutime vi veturas hejmen akurate je la deka.”

La grandaĝulo ne malkontentiĝis pri tiu interrompo. Li jam klare vidis, ke lia rakonto faris profundan impreson sur la koron de la juná amiko, kaj li pensis, ke pli bone estos, lasi lin almeti sian propran aplikajon.

\* \* \*

Malpli ol unu jaron poste Sinjoro Elmore ricevis inviton al edziĝa soleno: Sinjoro Allinson estis edziĝonta kun la virino, kiun li antaŭe malamis per pasio tiel profunda, ke nenio . . . . k.t.p.

## REZIGNACIO

La profunda blua ĉielo estas libera de la plej malgranda nubeto. La suno ĵetas trans la maro larĝan arĝentan ponton el helaj movantaj ondetoj, kiuj lumiĝas, kiel fajreroj, kaj ĝoje ludas, ekflamante kaj estingiĝante en la seninterrompa vetkurado, kaj ĉie ĉirkaŭe sur la bordo, nun riĉe pentrita per la multkoloraj aŭtunaj arboj, ĉie estas tiel multe da lumo. Ŝajnas, ke la naturo trankvile ĝuas la ekzistadon. Je tia tago la homo volus esti libera de la sufero, forĵeti la penigajn pensojn kaj per tuta animo senlime ĝoji en la vivo.

Tion pensis la juna kuracisto kiam li atingis la supron de la monteto kaj ekhaltis por admiri la vastan belan

vidaĵon. La sono de la urba horloĝo interrompis la ĉarmajn pensojn, alvokante lin al lia devo: li ja iras en la ftizejon.

Ho, la peniga kontrasto: sur la fono de l' gaja pejzaĝo tuta vico de palaj vizaĝoj kun malĝojaj malesperplenaj okuloj pasis antaŭ li. La penso pri la homa sufero forigis en unu minuto la senzorgan ĝuon je la vivo. Li volas rapidi al la malfeliĉaj gefratoj, li volas laŭ povo ilin helpi. Jes, li scias, ke plej ofte la medicino ne povas haltigi la forglitantan vivon, sed li penas ilin helpi almenaŭ iom plifaciligi la suferon.

Nun la kuracisto ne vidis plu aŭ la maron, aŭ la fruktoplenajn arbojn, kiuj bordis la vojon: lia penso estis okupata nur je la malsanuloj. Li bone konis iliajn biografiojn kaj karakterojn: kiom da ekzistadoj estas rompitaĵoj, kiom da junaj animoj pasie sed vane penas forĵeti la malbenitan jugon! Nur iafoje la juna vivo venkas en tia batalado kun la terura malsano. Ofte la foriranta vivo ŝajnas tiel necesa, tiel kara! Ekzemple S-ino Rivo, ĉu tiu ĉi koro enhavanta tiom da profunda sindonema amo, kiu povosciis, krei vere ŝatindan familion kaj samtempe estis malfermita al ĉiu homo, serĉanta spiritan helpon, ĉu ankaŭ tiu ĉi koro baldaŭ ĉesos bati? Kaj la juna Lila?

Sed jen la kuracisto staras jam antaŭ la ftizejo. Ĝi lin rigardas per la okuloj de la malfermitaj fenestroj; el unu alflugas mallaŭta tuso. Post kelkaj sekundoj en sia longa, blanka kuracista vesto li estis pasanta de unu ĉambro en alian, aŭskultante la plendetojn de la malsanuloj. Li alvokis tutan povon de l' scienco por ilin helpi, sed li vidis, ke ĉio dependas de ia blinda forto.

Kiam li estis ankoraŭ en la unua etaĝo la flegistino de la dua venis rapide lin antaŭsciigi, ke Lila estas preskaŭ mortanta. Forte batis lia koro, kiam li eniris en ŝian ĉambreton. Ne, ŝi vivas ankoraŭ, ŝi eĉ turnas al li sian palan vizaĝon tute ĉirkaŭitan per oraj bukloj. Kareseme rigardis lin ŝiaj bluaj okuloj, en kiuj lumis adiaŭe saluto. "Kara doktoro," eksonoris ŝia mallaŭta voĉo, "diru al tiuj, kiuj malesperas, ke nek la malsano, nek la morto mem povas rompi la homan animon. Ili nur kredu, ke

la homo estas pli forta ol la plej grandaj suferoj, la plej grandaj malfeliĉoj; nenio devas lin senfortigi, ĉesigi la belan liberan homan vivon! Tio ĉi estis la kredo de mia vivo, tio estas nun mia lasta penso kaj vorto. Adiaŭ, kara. . . .” Ŝi interrompis kaj fermis la okulojn, lacigita per la longa parolado. La pulso batis la lastajn batojn.

La penso de l' kuracisto ŝajnis petegi. “Ne mortu, Vi, kiu portas la signon de la plej alta homa beleco, ne foriru! Ne forvelku, la plej delikata ĉarma floro de l' homa spirito! . . . .”

Ŝi foriris. La belaj okuloj sin fermis por ĉiam; en la mano de l' kuracisto kuŝis jam rigidiĝanta maneto.

Senmove, kiel ŝtonigita per la senlima doloro, longe staris la kuracisto apud la mortintino. Sed kiam li levis la okulojn kaj vidis la altan bluan ĉielon, majesta trankvileco malsupreniris en lian animon. La blua ĉielo, blua kiel ŝiaj okuloj, ŝajnis lin demandi: “kial do vi ploras, ke la floroj forvelkas, ke la homoj foriras?”

V. LEVANDOVSKA.

## MALJUNA FRENEZULINO

DE ANDRZEJ NIEMOJEWSKI

Sovaĝa, terura vizaĝo. Ĉiam kunigitaj brovoj, deprimita rigardo. Kuprakolora frunto, sunbrunigita, kovrita per malpuraĵo, kolere traplugita per faldo. Figuro duone nuda, kovrita per ĉifonita, kotkolora jupo. Sur la brusto—disŝirita, ses jarojn neŝanĝita ĉemizo. Kiu ajn renkontas tiun virinan fantomon, foriras timeme de l' vojo. Tio estas konata, maljuna frenezulino.

Kial maljuna? Ha, ĉi tie tempo kuras rapide! Ses jaroj iam faras de l' homo maljunulon.

Ĉiutage, ĉirkaŭ tagmezo, direktiĝas la maljuna frenezulino al Radochy. Tiam ŝi estas mirinde malkvieta. Ŝi spiras rapide, vidas nenion ĉirkaŭ si, timeme observas malproksimecon, komencas kuri. Ŝi preterpasas malnovan ŝakton “Zygmunt,” enkuras “Malvivan Arbareton,”

rapidiĝas laŭlonge de Przemsza al estinta minejo de "Dia Beno," nun simila al profunda faŭko de superakvigita kratero. Alproksimiĝante tiun krateron ŝi komencas eligi malakrajn ĝemojn, ŝia terura vizaĝo esprimas konsternan timegon, ŝia buŝo spasme kurbiĝas. Ŝi genufalas, ŝirmiĝas per manoj, kvazaŭ volante forpeli ian vizion, ŝia krio aŭdiĝas malproksime; fine, ploregante, ŝi kliniĝas teren, ploras ĉiam malpli laŭte, ĉiam pli malforte, ekdormas. Ne pli frue, ol post sunsubiro, ŝi leviĝas, iras antaŭen, ĉirkaŭas kampojn, koloniojn, eterna vagulino, maljuna frenezulino.

Antaŭ ses jaroj, dum bela julia tagmezo, ŝi iris tie, ŝi—juneta, belega virino. Freŝa estis ŝia vizaĝo, helaj, ridetantaj estis ŝiaj okuloj. Unu semajno post la edziniĝo ŝi rapidis tien, portante tagmanĝon al sia edzo. Li laboris en la minejo. Tiu kratero ankoraŭ preskaŭ ne ekzistis. Ĝi tiam ekstaris antaŭ ŝiaj okuloj.

Ĉi tie bolis vivo. El potenca fabriktubo eliĝis fumo, la radoj super la ŝakto ne haltiĝadis. Sur la rubamaso svarmis popolamaso. Preterkuradis centoj de vagonetoj. Ĉio forpasis, kiel sonĝo.

Sur la fundo de la minejo kelkcentoj da ministoj formis en la irejoj kaj sur la oblikvaĵoj alian mondon, mondon subteran. Minejo de "Dia Beno," unu el la plej malgrandaj de la minregiono, donis grandegan profiton, dank' al facileco kun kiu oni eligis karbon.

Sed ĉe la sud-orienta flanko, kie troviĝis la plej riĉa tavolo, staris baro de malpermesita mineja frukto. Kiomfoje oni difektadis tiun baron, tiomfoje aperadis la plej timiga malamiko de minejoj, ŝlimo, nomita "polva nubajo," ĉar, disvastiĝante subite en la irejoj, ĝi kaŭzas trablovon de aero, blovadon, polvaĵon.

Multe da jaroj estis kviete, polva nubajo ne aperadis, oni forgesis pri la blovo.

Unufoje elĉerpiĝis lignaj rezervoj, oni decidis "forrabi" parton de malnova minejo, tio signifas forpreni de tie lignon, fortikigantan ŝtonegon. Oni alproksimiĝis al tiu fatala baro.

Sed apenaŭ oni ektuŝis la unuajn subapogaĵojn, kiam disetendiĝis terura krako; la roko rompiĝis, komencis fali,

kaj tra la truoj elverŝiĝis polva nubajo tiel forte, ke jam post kelkdeko da minutoj ĉiu reveno estis malebligita. La polva nubo superverŝis ĉefan irejon, per la deklivaĵo atingis suprajn etaĝojn. Super ĝi formiĝis grandega turniĝo de la tero, ekscitita je ducent metroj; la turniĝo atingis supraĵon, disiĝis terura abismo, kaj el nevideblaj fontoj elfluegis akvo, plenigante ĝin ĝis la randoj.

La minejo "Dia Beno" ĉesis ekzisti, kune kun kelkcentoj da laboristoj fermitaj en ĝiaj profundaĵoj.

Kiu vidis tion—povis freneziĝi!

La tago estis belega, la suno atingis sudon, ĉirkaŭe murmuris arboj de Radochy, kiam subite, ĉe la piedoj de la juna virino, monstre disiĝis la tero, montriĝis terura, nigra abismo, en ĝian profundaĵon ekfalegis rubamasoj vagonetoj, laboristoj, popolamasoj, kaj post momento ĉio malaperis kvazaŭ konsternanta vidaĵo, superverŝita per de ĉie elfluanta akvo.

Sur la fundo de tiu infero restis feliĉo de juna virino, ŝia edzo, ŝia tuta estonteco.

De tiu tempo ŝi vagas nokte en la ĉirkaŭaĵo, ŝi maljuniĝis antaŭtempe, deŝirita, deprimita, sovaĝa, sed ĉiutage, antaŭ la tagmezo, vekigis en ŝia memoro la pasinteco, malkvieta ŝi rapidiĝas tra la "Malviva Arbareto," iras laŭlonge de Przemsza, kuras al minejo, kie ŝia juna edzo atendas tagmanĝon. Ĉiutage ĉe ŝiaj piedoj disfaliĝas la tero, montriĝas abomena faŭko, enfalegas rubamasoj popolamasoj, elfluegas akvoj. Timiganta krio disiĝas ĉirkaŭe. Maljuna frenezulino falas kun ĝemo teren, renversiĝas, ploregas, senfortiĝinta ploras ĉiam pli mallaŭte kaj fine ekdormas.

Kiomfoje mi ŝin vidas en tiu loko, tiomfoje ankaŭ miaj pensoj komencas malklariĝi.

*El lingvo pola tradukis kun afabla permeso de  
l' aŭtoro*

VLADISLAVO MERGEL

## MORTINTAJ FOLIOJ

DE ANNA MAR .

Hodiaŭ la duan fojon Levkoviĉ faris al mi edziĝproponon. La unuan fojon ĝi estis printempe, dum pikniko, preskaŭ antaŭ du jaroj,—nun estis aŭtuno, kaj mi revenis en malnova vestaĵo el arbareto.

Mi diris:

“Mi vin dankas, sed, se eble, atendu mian respondon ĝis la vespero.”

Mi ne scias, kion mi atendis vespere,—tamen mi tiel diris.

En nia hejmo sidis la juna arbaristo Jan Vorohovic. Mi aŭdis, ke li gaje ridis pri io, frapetis per sia pafilo, kaj interparolis kun mia patro.

Mi brodis, pensante: “Li ne devus venadi ĉe nin tiom ofte kaj min inciteti. Ĉu eble li malpaciĝis kun Elnjo? Mia patro lin tedas. Kaj mi? . . . Nu, kian valoron mi povas havi por li, S-ro Vorohovic, arbaristo, la plej bela kaj instruita homo en nia regiono?” . . . Ke li eble divenas miajn sentojn, estus por mi pli terure ol la morto . . . Mi ree ekpensis: “Ĉu eble li malpaciĝis kun Elnjo?”

Mi ne scias kial, sed mi firme decidis, ke Vorohovic estas enamiĝinta je Elnjo. Vere, ĝi estus neniel mirinda: Ela, rozvanga, gracitalia, graseta knabino kun blondaj haroj, ĉiam vestas sin hele, portas silkajn jupojn kaj eĉ unu fojon venis ĉe nin parfumita. Ŝi movas sin brue, vigle kaj alloge ridas,—vera printempa turnvento.

Mi ĵaluzis ŝin dum mallonga tempo: ĉu do ŝi estas kulpa, ke ŝi estas bela kaj plaĉas al la arbaristo? . . .

Mi atente aŭskultis, pri kio Vorohovic parolis kun mia patro, kaj ne eliris el mia ĉambro, penante konvinki min mem, ke ili min ne bezonas; ili havis ĉion necesan,—manĝetaĵon, mielvinon, ŝakojn, du komfortajn apogseĝojn apud malfermita fenestro kaj eĉ du tapiŝetojn ĉe la sojlo por viŝpurigi la piedvestojn . . . Tamen poste mi decidis, ke devo de dommastrino estas ĝentileco, kaj mi eliris, min turnante al la gasto kun la vortoj:

“Bonan vesperon!”

“ Bonan vesperon, fraŭlino Roza ! ”

Kiajn sincerajn, belajn okulojn li havas ! Estas tute ne eble koleri kontraŭ li !

“ Vi estas veninta el la grafina biendomo ? ” mi demandis, kvankam mi tion ja bone sciis : kie do li povis sin trovi, se ne tie, kie li loĝas kaj havas oficon ?

“ Jes, mi venis el la grafina biendomo,—li respondis ĝentile,—la grafino vin salutas kaj petas, ke vi venu ĉe ŝin hodiaŭ . . . Fraŭlino Tomaŝevska estas ankaŭ tie.”

Al mi tute ne plaĉis, ke li diris “ F-ino Tomaŝevska,” sed ne simple “ F-ino Ela,” kiel ĉiam, kvazaŭ li timus nomi ŝin laŭ ŝia baptonomo, kaj malzorge sin apogis al la seĝo.

Mi respondis sektone :—

“ Bonvolu transdoni mian dankon al la grafino, sed mi sentas min malbone kaj ne povas viziti ŝin.”

Poste, ŝajnigante, ke mi ne rimarkas lian ĉagrenitan mienon, mi min turnis al mia patro.

“ Vi nenion bezonas, paĉjo ? ”

“ Ne, mia filineto.”

Kaj mi ree foriris en mian ĉambron. Miaj vangoj flamis. Al mi estis ridige kaj honte: pro kio mi ekludis rolon de principino ? Oni nur pripensu, efektive, . . . la filino de la bienadministranto ne volas iri en la grafinan biendomon ! . . . Sed, se la grafino morgaŭ ekkoleros kaj forpelos la administranton, tiam li kaj lia filino estos devigataj almozpeti . . . Tio ne estos plu ridiga, sed eĉ iel tragika. La patro ekkoleris kaj frapetis per sia forko kontraŭ telero ; li kriis pri malordo en la bieno kaj tiom flamiĝis, kvazaŭ la bieno apartenus al li mem ; lia opinie, ĝin forvendi estis la plej urĝa afero : la grafino ruiniĝas, ŝi estas maljuna, kaprica, senvola ; eĉ la vilaĝanoj ne donas plu buteron, ovojn kredite, timante, ke oni ne pagos al ili. La arbaristo kontraŭdiris : ne, ne, tute ne estas necese vendi la bienon, same nobelan kaj maljunan, kiel la grafino mem ; nur iom da mono—kaj ĉio estas bonega.

Mi pense skulevis la ŝultrojn. Kial li defendas la grafanon ? Ĉu eble al li tiom imponas la titolo,—aŭ li



sentas dankemon, ĉar ŝi klopodas edzinigi Ela Tomaŝevska kun li? . . . Poste mi ekhontis pri miaj pensoj kaj rekomencis mian brodadon.

La patro kaj Vorohovic disputis nun pri ĉaso.

La sunsubiro estis purpura, bela. Same varma roza koloro kuŝis sur betuloj, aceroj, arbetoj. Multego da kornikoj flugis apud la barilo, en la ĝardeno, super la kampo, kie amase nigriĝadis neforveturigitaj betoj, kovritaj per sia propra putriĝanta foliaro.

Aŭtune mia koro pleje doloras. Miaj pensoj intermiksiĝis kun rememoro, ke mi estas malriĉa, nebela, nejuna, kun ĉiamaj zorgoj pri hejtligno, pri truita domtegmento, rompita ŝtuparo. Ha, kiel nia dometo ruiniĝadis, ĉiutage, okulvideble! Grafina bienadministranto! Oni povus opinii lin grava persono, sed en realeco. . . . Ho, Dio! . . .

Ni vivas kiel sovaĝuloj: tutajn monatojn ni neniun vidas, krom la grafino kaj la arbaristo. Mi ne ŝatas viziti ŝin, kvankam paĉjo tion postulas. Tute ne. Malaltaj, mallumaj ĉambroj,odoro de naftalino, polvo, katoj, tuta aro da hundaĉetoj, la kaduka grafino kun flartabakujo kaj bluaj okulvitroj, malĝentila, akirema servistaro. Kiel ĉio ĉi estas malĝojiga,—eĉ rigardate el-flanke! . . .

Mia patro ne volis forlasi la bienon pro dankemo: la grafino iam bonfaris al mia patrino, doninte al ŝi monrimedojn por studi en konservatorio. Panjo iam kantis en Varsovio,—tie ŝi ankaŭ mortis, aŭ eksterlande. Kiam mi estis ankoraŭ infano, mia vartistino diradis, ke panjo agis malbone. Poste la opinioj estis diversaj: la grafino aprobis ŝin; la pastro asertis, ke scenejo estas peka; paĉjo opiniis, ke profesio de aktorino estas nedeca okupo por nobelino. Kaj mi tute ne scias, ĉu panjo agis bone aŭ malbone,—mi konjektas nur, ke libereco estas preferinda al nia kamparo kaj senlaŭteco. Kompatinda panjo! Ŝia portreto pendas super mia lito: ŝi estas blonda, bluokula, kiel reĝino, en malhel-verda, tre mallarĝa robo kun puntaĵo ĉirkaŭ la nuda kolo. Vorohovic ravadmiris ŝin.

Ela Tomaŝevska havas la saman tipon, nur malpli delikatan. Tial kredeble, la maljuna grafino adoras

Ela. Tamen al ŝi mankas afabla simpleco kaj bonaj manieroj. Ela estis edukita en provinca pensiono. Kaj mi nenie ricevis kompletan instruon kaj heredis de mia patrino sole ŝiajn manojn; Vorohovic diras, ke ili estas "muzikemaj,"—mi estas tre fiero pri tio.

Miaj pensoj ree sin turnis sur min mem. Mi ĉiam pripensadis, kiamaniere mi povus eviti la humiligajn renkontojn kun la arbaristo. Kial li rigardas min tiel atente? Kiucele li estas kontenta, se li povas kaŭzi al mi iun ajn malagrablajn? Kion malbonan mi faris al li finfine? Se li imagas . . . mi ja ne donis al li pretekston.

"Roza devas iri ĉe la grafino,"—aŭdiĝas la intence laŭta voĉo de mia patro, "ŝi devas . . . la grafino estas bona al ni, kiel anĝelo. Ni ŝuldas al ŝi ĉion."

Ha, kara, naiva paĉjo! . . . Mi ne volis lin inciti, tial mi eliris el mia ĉambro, ĉirkaŭbrakis lian kolon, ordigis lian kravatton kaj kisis lian rozkoloran kalvaĵon.

"Mi malsanetas, paĉjo . . . iru sola . . . jen S-ro Vorohovic akompanos vin. . ."

La patro mildiĝis, sed la arbaristo mimike esprimis malpaciencon . . . eĉ malkontenton. Li kvazaŭ volus diri: "ne estas via afero, fraŭlino,"—sed sin detenis. Mi sentis, ke mi ruĝiĝas, kaj timis rigardi liaflanken.

Forirante, la patro diris:

"Roza, vi ne devas plori."

Mi eĉ sufokiĝis! La patro estas ĉiam simplanima kaj nenion divenas. S-ro Vorohovic fumis kaj ŝajnis, ke li nenion aŭdis. Dankon al li!

Mi dumlonge sekverigardis ilin. La patro, malalkreska, rondkorpa, en flava kostumo kun ruĝa koltuko—kaj Vorohovic, altkreska, belstatura, en ĉasista jako kun pafilo. Mi ekmemoris la blondan Elnjon. . . Jes, ili estas vere traftaŭga paro. . . Mi eksentis malvarmon.

Ekzistas nenio pli terura, ol esti malbela. Kiam S-ro Vorohovic min rigardas, mi sentas la tutan malallogecon de mia pala, laca mieno, malgrasaj ŝultroj kaj blue-nigraj haroj. (Mi estas certa, ke li ŝatas blondulinon). Kaj mi hontas . . . mi hontas ĝis la larmoj. . . Mi hontas pri ĉio . . . eĉ pri mia malnova

vesto. . . Jes, estas penige, scii pri si mem, ke oni estas korpe malaminda. . . Ha! . . . Ela neniam spertos tion. . .

Malantaŭ la fenestro ade falis la velkintaj folioj, kaj min tuj ĉirkaŭkaptis tia korpremiga malĝojo, ke mi ekploris, ligis tuketon sur mian kapon kaj foriris en la arbareton. Mi sciis, ke mi havas eliron—doni konsenton al S-ro Levkoviĉ. Tiam mi ne sentos plu malriĉecon kaj ne ruĝiĝos pro honto antaŭ la arbaristo. . . .

Levkoviĉ estas klera, monhava homo. Oni diras pri li nur bonon. Lia unua edzino mortis frue, kaj li adoras sian filineton. Li mem kaj la knabineto estis jam delonge simpatiaj por mi,— sed fiksa ideo pri Vorohovic plene okupis mian cerbon, kaj mi ne povis liberigi min de ĝi.

Sed nuntempe mi sukcesis konvinki min mem. Estas ja necese malfermi la okulojn. Tridekjara . . . malbela . . . malgrasa . . . pala . . . sendota. . . Por kiu vi povas esti interesa, mia kara ?

En la arbareto la betuloj staris orumitaj, kaj la aceroj estis jam defoliigintaj . . . ĉirkaŭe multege da mortintaj folioj,—iliaodoro, forta, aŭtuna, ĉiam plenigas la koron per neesprimebla malĝojo. Mortintaj folioj. . . Ha, kia malgaja kaj samtempe bela emblemo de nia vivo! . . . Ĉi tie ankaŭ flugadis multe da kornikoj; ili vigle interparoladis kaj balanciĝis sur tiom maldikaj branĉetoj, ke ili ŝajnis tuj rompiĝontaj. Estis tute kviete, kvazaŭ la arbareto korenuis, kunpremiĝis kaj eĉ ne plendis. . .

Mi kelkajn fojojn rerigardis al la biendomo. Tie nun mia patro dismetas paciencludon kun la grafino, kaj Vorohovic petas Ela ludi fortepianon. Ŝi mokincitas lin, rifuzas, koketas, kaj ŝiaj okuloj brilas. Jes, mi scias,—estas tiel, tiel. . . Ju pli klare mi prezentas ilin al mi kune, des pli dolore kunpremiĝas mia koro, kaj des pli konvinka fariĝas la neceso akcepti la proponon de Levkoviĉ.

La domo de Levkoviĉ staras tuj post la deklivo malantaŭ la arbareto, kaj lia magazeno sin trovas en la urbeto, apud la stacidomo, je distanco de tri verstoj. Mi decidis, ke se mi renkontos Levkoviĉ solan apud lia pordego,

ĝi estos bona antaŭsigno, kaj mi senprokraste diros “jes.” Mi ne povis rememori lian vizaĝon, tiom ordinara ĝi ŝajnis al mi.

Mi ofte alkroĉiĝis per mia jupo al sekaj branĉoj, kelkajn fojojn mi sidiĝis sur arbostumpoj kaj ploris. Kaj la folioj senintermanke ŝutiĝis, ŝutiĝis, mortante sen doloro, sen bedaŭroj, sen agonio,—kaj mi enviis ilin. . . La vesperruĝo estingiĝis. Fariĝis malsekete. La arboj kvazaŭ fumiĝadis. Ekblovis venteto. La kornikoj ne interparolis plu, forfluginte.

“A-u-u!”

Mi levis la kapon kaj tute ne ekmiris. Levkoviĉ proksimiĝadis kun sia filino.

“Bonan vesperon,”—li ekkriis emocivoĉe ankoraŭ elmalproksime,—“bonan vesperon!”

Mi ekridetis. Lia knabineto estas tre ĝentila, en blua kaptuko kaj ĉelteksita vestaĵeto. “Mia estonta duonfilino,”—mi ekmeditis, sentante nek ĝojon, nek miron, nek ĉagrenon. Ŝi alpremiĝadis al sia patro, kaj li ridetis konfuzmiene. Li ne povis diveni, ĉu mi diros “jes” aŭ “ne.” Liaj grandaj manoj estis malvarmaj kiel glacio, kaj li tuta kvazaŭe kuntiriĝis. Mi decidis eble plej rapide fini la aferon,—mia koro tro doloras,—kaj diris:

“Lasu Jonjon kuri antaŭen.”

La knabino obeis, kaj mi deklaris al Levkoviĉ mian decidon. Ĝi fariĝis pli facile, ol mi supozis.

Levkoviĉ ekmurmuris:

“Dio benu vin, fraŭlino Roza . . . malfeliĉan homon vi faras feliĉa.”

Kaj, sin klininte, li kisis mian veston. Tiam mi ektimis, rapide adiaŭis lin kaj iris hejmen, ne rerigardante. Mi min demandis: “Pro kio ci tion faris? Dio mia, pro kio ci tion faris?”

La folioj, la mortintaj folioj, susuris sub miaj piedoj mistere kaj indiferente. En la fenestroj de nia domo brilis lumo. Je mia miro mi trovis tie Vorohovic. Li estis profunde enpensiĝinta kaj ne aŭdis mian revenon. Mi rigardis longe, dum kvinkelke da minutoj, lian belan, fieran kapon, lian malzorgan sintenon, la feltan ĉapon. Interne de mi ĉio ŝiriĝis, kaj mi demandis tra larmoj:

“ Kio ? vi revenis,—vi estas tie ĉi ? ”

Li ekstremetis, saltleviĝis kaj komencis ridi. Mi neniam estis aŭdinta, ke li tiel feliĉmiene ridus.

“ Ah, Fraŭlino Roza ! . . . Fraŭlino Roza ! . . . ”

Kaj etendis al mi la manojn.

Mi nenion komprenis. Al mi ŝajnis nur, ke tuj okazos io terura, kaj mi prenis seĝon. Sed li adis ridi kaj ripetis :

“ Kie do vi estis tiom longe, karulino ? Dio mia, mi atendas, atendas . . . kiom da ruzaĵoj mi elpensis, por forkuri de la grafino. . . Ah, Fraŭlino Roza, Fraŭlino Roza ! . . . ”

Vidante, ke mi silentas, li kvietiĝis kaj diris per karesoplena, profunda voĉo :

“ Ĉu do vi ne divenas ? . . . Ĉu vi divenas nenion, mia kara, mia bona ! . . . ”

Kaj mi respondis apenaŭ aŭdeble :

“ Mi jam donis mian parolon al Levkoviĉ. . . . ”

Mi memoras nenion plu. . . .

*El la rusa lingvo tradukis*

D-RO ANDREO FIȘER, L.K. (Tiflis).

## PRATEMPA

La mondo kovriĝis per vegetaĵoj grandaj kaj de riĉaj koloroj. Strangaj arboj kreskis dense, kaj inter ili moviĝis nenaturaj bestoj ; homoj, ankaŭ, ĉar tiel ni devus ilin nomi, kiuj jam eltrovis fajron, kaj, aldone al siaj fruktoj kaj radikoj, komencis sin nutri per rostita karno.

En la krepusko, kiu ŝetis misterajn nigrajn ombrojn, ŝajne por terurigi la homojn, sidis antaŭ kaverno tri : du viroj kaj unu virino. Falis la nokto.

Tiam unu viro sin levis kaj, streĉinte sin, eniris la kavernon. Denove aperinte li portis en la mano grandan bastonon.

Tie li staris, giganta viro, kovrita per multe da haro, kruela vizaĝe, fortega muskole. Post ĉirkaŭrigardo li komencis grimpi supren sur la krutaĵo, ĉiam atentante pri eblaj danĝeroj, eblaj malamikoj : tiutempe morto

venis subite, neanoncite.

Fine li atingis la enirejon al alia kaverno, kiu similis la unuan. Antaŭ tiu ankaŭ troviĝis fajro, por timigi bestojn kaj varmigi la malvarman noktan aeron. En tiu la homoj jam kuŝis sur sekigitaj kreskaĵoj.

Zorge, eĉ pli zorge ol antaŭe, la alveninto enrampis, kaj ĉe la flanko de la kaverno staris dum kelkaj minutoj ĝis li povis travidi la mallumon. Sur la kreskaĵoj du homoj, volvitaj per besthaŭtoj kuŝis profunde dormantaj.

Unu el ili ekmovis; antaŭensaltis la alveninto, kaj per rapida bato frapis al li per la bastonego kiun li portis. Sed la dorminto eĉ pli rapide forrulis sin. Tuj komencis furioza batalo inter la du, kaj aŭdiĝis ĝemoj kaj kruelaj kriegoj, dum la alia dorminto, virino, flankeniris kaj kriadis pro teruro.

Subite la batalo finiĝis; kun ĝemo de unu el la batalantoj, kaj venkokrio de la alia. El la du viroj nur la entrudanto vivis; la alia dormis por ĉiam.

La venkinto sin turnis al la virino, kiu terurigita, penis forkuri, sed vane: unu grandan salton faris, la viro ŝin kaptis per la haroj, kaj duone fortiris, duone portis ŝin al la alia kaverno.

Homo gajnis edzinon, homo perdis edzinon—kaj ĉion.

*Originale verkis.*

CHARLES H. EDMONDS

## ELEKTITAJ LIBROJ

**La Urbestro de Zalamea**, verkita de CALDERON DE LA BARCA. *El la Hispana Lingvo tradukis* ENRIQUE LEGRAND. Eldonita de la tradukinto, Montevideo 1925. Havebla ĉe la B.E.A.

Estas personoj, nemalgravaj, kiuj rigardas ĉi tiun dramon kiel ĉefverkon de la mondfama Hispana aŭtoro. Ĉiuokaze ĝi estas granda verko, kaj sendube nia Esperantista libraro estas multe riĉigita per ĝi.

Calderon naskiĝis en Madrid en Januaro de la jaro 1600. Lia patrino, kiu estis flamanda, mortis en 1610, kaj lia patro en 1615. Oni intencis, ke la junulo eniru la Roman Eklezion, sed li studis leĝon, kaj ĉe la literaturaj festoj en 1620-1-2 li sukcese konkuris. Oni diras, ke li servis kun la Hispana armeo en Flandro kaj Italujo iam dum 1625-35, sed ekzistas leĝaj dokumentoj, kiuj ŝajne

montras, ke li loĝis parte tiutempe en Madrid. Sendube, tamen, li servis en la Katalunuja militiro dum 1640-42; tial ni povas akcepti sen demando aŭ dubo lian rakontan bildon de la soldatoj aperintaj en la dramo. Li mortis en la jaro 1683.

Por fiksi lian pozicion en la mondhistorio ni konsideru vicojn da datoj. Felix de Vega Lope (ankaŭ Madridano) 1562-1625; Shakspeare 1564-1616; Calderon 1600-1683; Milton 1608-1674. La okulo vidas tion, kion la menso alportas povon por vidi.

En periodo kiam la ĉiutaga parolo estis distingata per maldelikata lingva libereco ne nun akceptebla, Calderon skribis ĉiam kun pureco de intenco, kaj liaj verkoj sekve, entenas ĉarmon de esprimo malpli ofte trovebla en la verkoj de Lope. Oni diras, ke "La Urbestro de Zalamea" estas bazita sur kruda skizo jam skribita de Lope. Se tio estas vera, Calderon nur sekvis kutimon de sia tempo. Ni povas danki al li eĉ kiel ni dankas al Shakspeare pro liaj reskriboj de rakontoj kiujn li trovis kurantaj en lia rondo.

La historio mem estas jena: Marŝante de loko al loko taĉmento da soldatoj trapasas malgrandan urbon. La oficiro komandanta ilin perfortas la ĉastecon de la filino de homo, kiun tuj poste la urbanoj faras Urbestro.

La patro proponas, petegas de la Kapitano edziĝon kun la filino; la Kapitano rifuzas. Tiam, kiel Urbestro la patro arestas la oficion, kaj, fine, sufokas lin. Supera oficiro rigardante la aferon el la kutimoj kaj kun la spirito de tiu tempo estas vengonta la mortinton, kiam la eniro de la Reĝo haltigas lin; tuj klarigo de la tuta afero sekvas, kaj la Reĝo deklaras ke la mortpuno estas justigita per la krimo.

La personoj de la dramo estas sufiĉe klare karakterizitaj. La diskutoj inter la Urbestro dum li ankoraŭ estas simpla 'plebano' kamparana, kaj maljuna nobela oficiro, estas plenaj de bonhumora spriteco. La malsufiĉa animo de nobelaĉo sin eldiras en ĉiu lia vorto. Ni sentas, ke ni rigardas bildon de reala, tiam aktuala vivo, kaj, vere, tiel realiĝas la celo de la dramo.

La Esperanto de la traduko ŝajnas al ni, plejparte, flua, facila, klara kaj neniel malforta; pli bona ol analiza kritiko, sendube estos ekzemplo: okazas ke la dramo entenas notindan sekcion, kiun ni nun citos, kaj kiu ebligas al la leganto juĝi por si mem. *Krespo* estos la Urbestro; li parolas al sia filo.

KRESPO : Dum sin preparas via estro, antaŭ  
Fratino kaj kuzino viaj, filo,  
Aŭskultu min atente. Dank' al Dio,  
Pli pura ol la sun' deveno via,  
Ĝi tamen estas tute pleba. Ĉiam  
La du kondiĉojn vi memori devos:  
L' unuan, por ke vi ne senfortigu  
La fierecon vian, nek forlasu  
Aspiron altan al pli alta sorto;  
La duan, por ke ne malpligrandigu  
Vin iam malkuraĝo. Ambaŭ tiujn  
Konsilojn uzu, sed humile ĉiam:

Se estos vi humila, vi elektos,  
 Laŭ rekta juĝo, la plej bonan vojon,  
 Kaj ankaŭ gajnos modesteco via  
 Indulgon pri eraroj eblaj, kiujn  
 Al fieruloj oni ne pardonas.  
 Ĉe kiom ja da homoj, humileco  
 Forigas la difektojn, sed kontraŭe,  
 Ĉe kiom da aliaj, malbonvole  
 Vidataj, oni ĉerpas la difektojn  
 Kaj eĉ elpensas ilin. Vi pro tio,  
 Ĝentila ĉiam eksterordinare  
 Kaj afablega, malavara estu :  
 Ĉapel' kaj mono varbas la amikojn.  
 Kaj tiom ne valoras l' oro, kiun  
 La suno naskas en la hinda tero,  
 Kaj l' ocean' al ni alportas, kiom  
 L' estimon ĝui de l' aliaj homoj.  
 Pri la virinoj, filo, vi neniam  
 Eĉ unu vorton de mallaŭdo diru :  
 La plej humilan ni estimi devas,  
 Ĉu ne virinoj estas la patrinoj ?  
 Pri kiu ajn motivo ne malpacu.  
 Mi kiam vidas tiujn majstrojn, kiuj  
 Instruas ĉie la skermarton.—kia  
 Lernejo estas tiu ĉi?—mi pensas ;  
 Ne devas nur junulo scii kiel  
 Gracie, lerte skermi kaj batali,  
 Sed, ja, pro kio li batali devos.  
 Kaj mi asertas, ke se majstr' ekzistus,  
 Nur unu, kiu saĝe la lernantojn  
 Instruu ne pri *kiel*, sed pri *kial*  
 Malpaci kaj batali oni devas,  
 Al li ni ĉiuj niajn filojn donus.  
 Konsilojn patrajn ĉiam memorante,  
 Antaŭen iru ! . . . Tre sufiĉan monon  
 Vi portas por elspezoj de l' vojaĝo,  
 Kaj por aĉeti, alveninte, paron  
 Da vestoj . . . Nun, Johano, per la nobla  
 Protekto de Don Lope kaj la beno  
 De via patro, mi esperas baldaŭ  
 Revidi vin en pli favora stato.  
 Johan', adiaŭ ! . . . Filo, tro kortuŝas  
 Min la malgaja vorto . . .

Ni ne povas ne kontrasti ĉi tiujn vortojn kun tiuj parolitaj de  
 Polonio al Laerto. Ne estas loko multe argumenti pri la valoro de  
 la konsilo, sed sendube, la animo de Krespo nekalkuleble superas  
 tiun de Polonio.

Ĉial, do, ni povas sensanceliĝe rekomendi la libron al ĉiu kiu  
 amas la belon kaj la veron.



**ĈIU ESPERANTISTO**  
**DEVUS PORTI**  
**LA VERDAN STELON.**

Ni tenas provizon diversan kaj  
ĝojos sendi detalojn al ĉiu petinto.

**B.E.A., 17 HART STREET, W.C. 1.**

**ABONU AL**  
**"INTERNATIONAL LANGUAGE."**

**Plej bona propaganda gazeto en la Mondo.**

**Enhavas 24 paĝojn. Kun ilustraĵoj.**

**Aperas mezmonate. 2 pencoj. 2/6 ĉiujare.**

**B.E.A., 17 HART STREET, W.C. 1.**

# LEGINDAĴOJ

Ĉiutage la Esperanta literaturo kreskas—ĉiutage aperas novaj libroj, kaj novaj eldonoj de malnovaj libroj. Esperanto estas vivanta lingvo, kaj lingvo de vivanta popolo.

La B.E.A. estas fiera, ke kiam eble ĝi havigas al si provizon de ĉiu nova bona verko, kiu aperas en iu ajn parto de la mondo. Jen listo de novaj libroj aperintaj lastatempe. Ilin ni rekomendas al niaj legantoj.

Petu nian kompletan Katalogon.

		<i>Afrankite</i>	
		ŝ.	p.
<b>International Radio Manual.</b> (Epton). Manlibro por ĉiu radiamanto. 80 p.	...	...	7
<b>Esperanto-Angla Vortaro.</b> E. A. Millidge. 5a eldono	...	...	7 10
<b>Index to the English words</b> in Millidge Esp. Eng. Dictionary	...	...	2 8
<b>La du ĉi-supraj Vortaroj.</b> Kune binditaj en tolo	...	...	10 6
<b>Oficiala Klasika Libro de Esperanto.</b> (Franca, angla kaj germana parto). 120 p.	...	...	1 2
<b>George Fox.</b> Fondinto de la Religia Societo de Amikoj (Kvakeroj) Van Etten. 16 p.	...	...	3½
<b>Pro Iŝtar.</b> Romano el antikva Babela historio. Orig. Luyken. 304 p.	...	...	6 11
<b>Saltego trans Jarmiloj.</b> Fantazia romano. Orig. Forge. 192 p.	...	...	5 4
<b>Al Eterna Paco.</b> Imanuel Kant (Christaller). 88 paĝoj	...	...	2 5
<b>Kriminologio.</b> Dr. R. Vambery (D-ro Toth). 88 p. Enkonduko al Kriminologio.	...	...	1 7
<b>Sonĝo de Someromeza Nokto.</b> Novaj prezoj: Paperbindita 1ŝ. 1p., Kartonita 1ŝ. 7p., Tola 2ŝ. 1p., Leda	...	...	5 2
<b>Eŭropo ĉe la Ablemo.</b> Nitti (Kreuz). 180 p. Bonega traduko de mondfama verko de Nitti.	...	...	3 3
<b>Kvin Noveloj.</b> Tuglas. Trad. el Estona. 176 p.	...	...	3 9
<b>Marta.</b> Orzesko (Zamenhof). Nova eldono de tiu klasikaĵo	...	...	4 0
<b>Reĝo Lear.</b> Shakespeare (Curry & Ashley). Bela traduko de eble la plej fama verko de la "Bardo Avona." Paperbindita 2ŝ. 8p. Tole	...	...	3 9
<b>Tragedio de la Homo.</b> Drama poemo de Emeriko Madach. Trad. de Kalocsay el hungara lingvo. 264 p. kun 20 paĝampleksaj gravuraĵoj kaj portreto. Ordinara eldono 4ŝ. 9p. Luksa	...	...	6 10
<b>La sendanĝereco de Francujo,</b> 158p.	...	...	1 8
<b>Tri Lirikoj de Shakespeare.</b> (Ashley kaj Coates). Tri kantoj kun muziko. Aĉetinda verko	...	...	1 8

**B.E.A., 17 HART STREET, LONDON, W.C. 1.**

Sewell, Presisto, Deal.

